Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 11 Aŭgusto 2022



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

**ENHAVO** **Paĝo**

| ENHAVO | Paĝo |
|---|---|
| La flago de la blanka kontinento | 3 |
| Ne-akceptita propono pri nova flago de Angolo | 13 |
| Belizo | 16 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 19 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 22 |
| La flagoj de la Papa Ŝtato | 23 |
| Veksilologia kuriozaĵo | 28 |
| La angulo de la blazonoj: *San-Marino* | 30 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Hispanaj aŭtonomaj komunumoj* | 31 |
| Trovu la eraron! | 33 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 34 |
| Veksilologia Humuro | 35 |


*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# La flago de la blanka kontinento

✍ *José M. Rodríguez (Hispanio)*

Sur ĉiuj mondo-partoj estas eble vidi centojn da flagoj flirtantaj. Ĉiuj landoj, ĉiuj urboj kaj eĉ ĉiuj grupoj fiere flirtigas siajn standardojn. Tamen, tio ne okazas ĉie. Ekzistas en la mondo kontinento oficiale reprezentata de neniu flago, temas pri Antarkto. Ĉe la granda blanka kontinento neniu lando ekzistis, temis pri sen-homa regiono, do, ne estis necese flirtigi flagon. Tamen, tio ŝanĝiĝis kiam oni organizis la unuajn sciencajn ekspediciojn.

En la jaro 1929, la brita ŝipo *Discovery*, partoprenanta en ekspedicio organizita de Britio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, hisis la unuan flagon celantan reprezenti la teritorion. La rakonto pri tiu unua hisado estas alloga. Protokole, kiam ŝipo eniras en eksterlandan havenon, ĉe la ŝipo oni hisas la nacian flagon de tiu haveno, kiel respekto-elmontro. Tiel, kiam la ŝipo *Discovery* albordiĝis Antarkton por malŝarĝi membrojn kaj ilaron de scienca ekspedicio, oni devus hisi la flagon de tiu teritorio, tamen tiu simbolo ne ekzistis. La kapitano de la ŝipo trovis solvon, li ordonis hisi blankan flagon, verdire la blanka koloro estis la plej taŭga simbolo de la kontinento. Tiu flago troviĝas nuntempe ĉe la Brita Muzeo en Londono.



Blanka flago flirtigita de la ŝipo *Discovery*
en la jaro 1929. Sendube jen la unua simbolo
reprezentanta la blankan kontinenton.

Kelkaj ekspedicioj poste okazis, tamen ili uzis nur la flagojn de la ŝtatoj organizantaj la sciencajn vojaĝojn. Same, se okaze de ekspedicio oni sciigis teritorian postulon, tiam oni hisis nacian flagon sur tiu teritorio. Ekzemple, la ekspedicio organizata de la nazia germana registaro en la jaro 1938, la partoprenantoj hisis naziajn flagojn en teritorio nomigita de ili kiel "Nova Suabio", kun la pretendo konsideri ĝin kiel germanan kolonion.




Emblemo de la germana ekspedicio en Antarkton
en la jaro 1938. Videblas limigita sektoro
postulita de Germanio kaj meze la nazia flago

La sciencaj kaj ankaŭ militistaj ekspedicioj iĝis pli oftaj post la dua mond-milito, same oni sciigis, fare de apudaj kaj foraj ŝtatoj, teritoriajn postulojn rilate antarktajn regionojn. Tiel, en 1959, okaze de la Internacia Geofizika Jaro, oni proponis la subskribon de internacia traktato rilate Antarkton. Laŭ ĉi tiu traktato oni malpermesis teritoriajn postulojn, kvankam oni akceptis ke ili ekzistis, temis pli malpli pri "frostigo" de tiu afero. La ĉefaj celoj de la traktato estis konsideri Antarkton nur por pacaj celoj kaj antaŭenigi internacian kunlaboron por subteni sciencajn esplorojn. La blanka kontinento ne povus esti platformo de internaciaj disputoj. La traktato estis subskribita en Vaŝingtono en la jaro 1959 kun ekvalido en junio 1961.

La Antarkta Traktato oficialigis neniun simbolon por la kontinento, kvankam en la jaro 2002, oni aprobis la flagon de la traktato mem, tio estas, ne de la teritorio, malgraŭ la fakto, ke ĝi eble estas la sola oficiala flago de organizaĵo sub kiuj reguloj, oni "administras" la teritorion. La oficialan simbolon kaj la flagon oni aprobis en renkontiĝo de la Antarkta Traktato okazita en Varsovio (Pollando) la 20-an de septembro 2002.




Flago de la Antarkta Traktato subskribita en la jaro 1959, tamen la flagon oni adoptis en 2002

Post ĉi tiu unua internacia traktato, Antarkto estis la celo de veksilologistoj, kiuj elrevis pri propra kontinenta flago. En la jaro 1978, Whitney Smith, de Usono, proponis flagon kie la oranĝa koloro elstaris. Verdire, tiu koloro troviĝas nenie ajn en Antarkto, pro tio ĝi estus facile videbla super la blanka fono de la teritorio. Sur la flago ankaŭ aperas granda litero A (Antarkto) super kvaron-cirklo, reprezentanta la kontinenton. Sube, du manoj tenas ĉion. Ĉiuj simboloj situas apud la masto, tio estas, ne meze de la flago. Tiel, la emblemo estas videbla eĉ se okazas fortaj ventoj kiuj ege flirtigus la flagon.



Flago pripensita de Whitney Smith, prestiĝa usona veksilologisto, kiu siatempe kunlaboris en la dezajno de la gujana flago.

Bazita sur tiu dezajno, Joanne Cooper kaj Stefan Trucker proponis en la jaro 1995 alian flagon. Ree, oni uzis kiel fonon la oranĝan koloron, sed ĉi-foje la desegnistoj aperigis la mapon de la teritorio en blanka koloro, stariĝas apude pingvino. Sube vento-rozo elstarigas la sudan pinton per litero S (Sudo).



Flago desegnita de Joanne Cooper kaj Stefan Trucker. Unuafoje oni uzas, por reprezenti Antarkton, mapon mem.

La graveco de ĉi tiu propono estas okulfrapa, ĉar sendube ĝi estis la bazo por la propono pri disvastigita de ebla antarkta flago, tiu de Graham Bartram de la jaro 1996.



Sukcesa propono de Graham Bartram en 1996

La simpleco de la flago igas ĝin eĉ pli alloga. La mapo mem reprezentas la kontinenton. Ĉirkaŭe, la maro aperas blu-kolore, en nuanco tre simila al la flago de Unuiĝintaj Nacioj, por montri, ke temas pri internacia teritorio. Ĉi tiu flago aperis unuafoje en la jaro 1996, okaze de eldono de tri-dimensia atlaso. La sukceso de la propono estis evidenta, depost tiam, ĝi estas uzata en ret-mesaĝoj kaj retejoj kiel emoĝio de la flago de la antarkta kontinento.



Emoĝio de la antarkta flago

La ideo aperigi nur la mapon de la kontinento ene de ebla flago estis bone akceptita, tiel, kiel dirite, en la jaro 2002 la estraro de la Internacia Antarkta Traktato aprobis sian oficialan flagon, tie ree aperas la mapo de Antarkto, kvankam kun meridianaj linioj.

Pli buntajn ideojn oni proponis ankaŭ. En la jaro 2000 David Halmiton diskonigis jenan flagon, kiu reale estas reprezento de la antarkta horizonto.




Tiel, sube aperas hel-blua strio simbolanta la glacion. Meze la flava koloro reprezentas la aŭstralan aŭroron. Sube, la blukolora bendo montras la antarktan nokton kaj ene de ĝi la sudkrucan stelaron.

Ŝokaj proponoj ankaŭ ekzistas. En la jaro 2007 Olivier Leroi prezentis jenan projekton, sur kiu aperas la koloroj de la imperiestra pingveno (*Aptenodytes forsteri*). La desegnisto uzis la kolorojn en la sama proporcio troviĝanta en la korpo de tiu birdo.




Flago aperiganta la kolorojn de la imperiestra pingvino

La lasta propono prezentita estas tiu de Evan Townsend, kiu jam estis oficiale adoptita de la ne-registara organizaĵo "Naciaj Antarktaj Programoj", kies celo estas ebligi sciencajn ekspediciojn en la blankan kontinenton. La flago ricevis la nomon "*True South*" (Vera Sudo). La aŭtoro prezentis tiun flagon en la jaro 2018, ĝi iomete similas al alia polusa flago, vere nord-polusa flago, tiu de Grenlando.



Sur la flago "*True South*" aperas nur du koloroj: blanka kaj blua; glacio kaj oceano. Temas pri du koloroj jam uzitaj sur aliaj projektoj. Meze stariĝas monto, kiel tiuj kiuj videblas ĉe la antarkta kontinento. De tiu monto eliras reflekto, ĝi tute similas al nadlo en kompaso montranta la sudan poluson.




Flago de Grenlando, sur ĝi ankaŭ aperas
bilda reflekto.

Kiel dirite, neniu el ĉi tiuj flagoj estas oficiala, escepte tiu de la Internacia Traktato. Same, oni jam diris, ke neniu teritoria postulo estas konsiderata laŭ la internacia juro, kvankam oni akceptas, ke tiuj postuloj ekzistas, eĉ Usono kaj Rusio rezervis al si la rajton prezenti teritorian postulon estontece. Tiuj ŝtatoj kiuj jam sciigis pri ties postuloj estas Argentino, Aŭstralio, Britio, Ĉilio, Francio, Norvegio kaj Nov-Zelando. Tiuj postuloj rilatas al konkretaj sektoroj de la kontinento aŭ al apudaj insularoj. Postulantaj ŝtatoj flirtigas flagojn en tiuj sektoroj, jen ili:

• **Argentina provinco Fajrolando, Antarkto kaj Insuloj de Suda Atlantiko.**

Ĉi tiu argentina provinco etendiĝas sur la orienta parto de la insulo de Fajrolando, la insulo *Estados* kaj apudaj insuletoj. Same sur sektoro de la antarkta kontinento postulata de Argentino kaj la insuloj Malvinoj, Sud-Georgio kaj la Sud-Sandviĉo. Pri tiuj insuloj ekzistas suvereneca disputo kun Britio. Rilate Antarkton, Argentino sciigis pri sia postulo de sektoro en la blanka kontinento en la jaro 1961.



Sur la flago aperas tutklare 3 sekcioj. Tiu oranĝ-kolora reprezentas Fajrolandon. La blua koloro estas la apuda maro kie troviĝas la insularoj, reprezentataj de la Sud-kruca stelaro. La blanka parto estas albatroso, simbolo de la libereco. Verdire, kvankam la jurisdikcio de ĉi tiu argentina provinco etendiĝas ĝis la antarkta sektoro postulata de Argentino, neniu blank-kontinenta simbolo aperas sur la flago.

• **Brita Antarkta Teritorio.**

Jam de la jaro 1908 Britio diskonigis sian postulon pri proprieto de regiono en la Antarkta kontinento. Oni reasertis tiun postulon en la jaro 1962, kvankam jam en tiu jaro, laŭ la Antarkta Traktato, neniu ŝtato rajtis posedi

terenon en la kontinento. La brita antarkta teritorio entendiĝas nur sur la kontinento kaj ĝi havas propran flagon kaj blazonon. Eĉ oni eldonas de tempo al tempo poŝtmarkojn, kvankam verdire ili estas vendataj nur al kolektantoj. Ĉe la teritorio loĝas 250 homoj en la somera sezono.




Ĝis la jaro 1963 ĉe la Brita Antarkta Teritorio flirtis la flago de la Falklanda Insularo (Malvinaj Insuloj laŭ la argentina nomo), ĉar el la administracia vidpunkto tiu teritorio dependis de la falklandaj aŭtoritatuloj. En 1963 oni hisis propran flagon. Ĝi estas simila al aliaj koloniaj britaj flagoj, kvankam la fono, anstataŭ blua, estas blanka, la koloro de la kontinento. Tamen, la enŝipa flago de la teritorio uzas saman flagon kun blua fono. Sur la flago aperas la blazono de la teritorio.



- **Ĉilia regiono Magallanes kaj Ĉilia Antarkto.**


Ĉi tiu regiono etendiĝas de la sudo de la lando ĝis la sektoro de la antarkta kontinento postulata de Ĉilio. Verdire, nur unu vilaĝo, kiu estas scienca bazo, troviĝas sur la antarkta kontinento. Ene de ĝi loĝas prok. 138 homoj.



La flago ekflirtis en la jaro 1996. En la suba parto aperas la montoj de la sudo de Ĉilio, la blankaj pintoj reprezentas la neĝo sur la montoj. La blua koloro reprezentas la ĉielon. La sud-kruca stelaro reprezentas la aŭstralajn regionojn. Same kiel la argentina flago, verdire sur la ĉilia flago aperas neniu simbolo rekte ligita al la antarkta kontinento.

- **Francaj Sudaj kaj Antarktaj Teritorioj**

Temas pri transmara teritorio de Francio, ĝi enhavas grupon de vulkanaj insuloj en la suda parto de la Hinda Oceano kaj la sektoron postulitan de Francio en la Antarkta kontinento. Ĉi tiu sektoro estas konata kiel Adelilando, ĝi estas bazo de francaj eksplor-ekspedicioj. Tie loĝas proks. 30 homoj vintre kaj 110 somere.



La flagon de la Francaj Sudaj kaj Antarkta Teritorioj oni aprobis en la jaro 2007. Sur blua fono aperas la franca flago kaj la literoj T-A-A-F (*Terres Australes et Antarctiques Françaises*). La signifo de tiuj kvin steloj ne estas tute klara, ĉar la dekreto mem kiu aprobis la flagon ne klarigas la aferon. Tamen, supozeble, temas pri la kvin distriktoj de la teritorio, inter ili la antarkta Adelilando. Do, sur la franca flago flirtanta ĉe la teritorio ne aperas simbolo kiu povus reprezenti la blankan kontinenton. Ĉe Adelilando loĝas neniu homo.

Aliaj ŝtatoj kiuj sciigis siajn teritoriajn postulojn rilate konkretajn sektorojn aŭ insulojn de la antarkta kontinento, tio estas: Norvegio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, ne aprobis specifajn flagojn por tiuj teritorioj. Do, okaze de ekspedicioj aŭ konstantaj setlejoj sur Antarkto, ili uzas siajn proprajn naciajn flagojn.



Ĝusta pozicio de la suda poluso. Apud ĝi flirtas flagoj de kelkaj ŝtatoj membroj de la Antarkta Traktato, kiuj havas permanentajn setlejojn en la kontinento

# Ne-akceptita propono pri nova flago de Angolo

*Lukas Toczki*

Kiam Angolo sendependiĝis en la jaro 1975, la flago de la nova ŝtato estis simila al tiu de la organizaĵo triumfanta en la kontraŭ-koloniisma milito unue kaj poste en la civila milito kontraŭ aliaj organizaĵoj, tio estas la MPLA (Movado Popola de Liberigo de Angolo). MPLA estis fondita en la jaro 1956 per kuniĝo de la Komunisma Partio Angola kaj la Partio de la Lukto Unuigita por la Afrikanoj en Angolo. En tiuj jaroj MPLA ricevis la helpon kaj la influon de Sovetunio kaj de aliaj komunismaj landoj en la mondo, pro tio la simboloj de la organizaĵoj estis similaj al tiuj de aliaj tiutempaj socialismaj movadoj.



Flago de MPLA en Angolo

La komunista movado triumfanta kreis la novan angolan flagon surbaze de sia propra standardo.



Flago de Angolo

La angola konstitucio specife detalis la kolorojn kaj ties signifojn de la flago, tiel, la ruĝa koloro reprezentas la sangon verŝitan de la angolanoj dum la kolonia subpremado kaj okaze de la lukto celanta la liberigon. La nigra koloro estas la simbolo de la afrika kontinento.

Meze de la flago aperas dent-rado, kiu reprezentas la laboristojn kaj la industrian produktadon. Ankaŭ videblas maĉeto, jen la simbolo de la terkulturistoj, de la agrikultura produktado kaj de la lukto mem de la popolo. La flava stelo estas komprenata en la tuta mondo kiel simbolo de la solidareco kaj prospero.

La malapero de preskaŭ ĉiuj komunismaj reĝimoj en la mondo moderigis ankaŭ la politikan sistemon en Angolo. Tiel, en la jaro 1991, MPLA rifuzis la marksisma-leninismajn politikajn teoriojn kaj ĝi enkadrigis sin en la Internacia Socialisma Movado. Same, novaj politikaj partioj aperis en Angolo.  Komence de la jarcento fondiĝis komisiono kun la celo redakti novan konstitucion, eblan ŝanĝon de la flago kaj blazono oni pripensis, ĉar la ruĝ-nigra flago intime rilatis al pasinta reĝimo kaj al konkreta politika movado.

Do, en la jaro 2003 la konstitucia komisiono diskonigis projekton pri nova angola flago, kiu devus estus aprobita de la Nacia Asembleo. La nova flago estus jena:



Laŭ klarigoj de la konstitucia komisiono, la blua koloro reprezentas sendependon, justicon kaj unuiĝon; la blanka koloro simbolas pacon kaj harmonion. La centra ruĝa bendo memorigas la heroojn kaj ties sinoferon. La plej okulfrapa simbolo de la nova flago estas la flava spirala suno, meze de la flago, kun 15 sunradioj. Temas pri antikva simbolo trovita en la surrokaj

pentraĵoj de *Tchitundo-Hulu*. La suno, en tiu flaga projekto, reprezentas la riĉecon kaj la kulturon de Angolo.



Sur-roka gravuraĵo troviĝanta en *Tchitundo-Hulu* (Angolo)

La konstitucia komisio elektis jenan proponon inter aliaj centoj da ili, konkrete ĉi tiu proponon iu prezentis sub la kaŝnomo "Catica". Li ricevis medalon kaj 20.000 usonajn dolarojn. Unuamomente, oni decidis, ke la nova flago estus oficiala post la ĝenerala balotado de la jaro 2005, tamen tio ne okazis. La projekto tuj ricevis kritikojn, inter alie, oni diris, ke ĝi estis tre simila al la flago de Kostariko.

Do, fine la nova flago neniam flirtis oficiale. La nova konstitucio aprobita en la jaro 2010 proklamas, ke *la nacia flago, la nacia blazono kaj la nacia himno, simboloj de la naciaj suvereneco, integreco kaj unuiĝo de la Angola Respubliko, estas tiuj adoptitaj okaze de la nacia sendependiĝo la 11-a de novembro 1975*. La teksto mem de la konstitucio inkluzivas sur la 1-a anekso bildo de la angola flago.



# Belizo

*Cristina Bollini (Italio)*





Belizo estas malgranda lando ĉe la orienta marbordo de Centra Ameriko, iama angla kolonio kun la nomo "Brita Honduraso". La nuna flago de Belizo estas adoptita la 21-an de septembro 1981, kiam Belizo akiris sendependencon. Ĝi konsistas el blua fono kun du horizontalaj ruĝaj strioj (supren kaj malsupren), kiuj estas 1/5 de la flaga alto. Ene de la flago, fermita en blanka cirklo, aperas la blazono de Belizo, oficiala heraldika simbolo de la lando, kiu estas uzita depost 1981, sed oficialigita en la jaro 2019.

Okaze de la sendependiĝo, la PUP (*People's United Party*) proponis bluan flagon kun la blazono meze, sed UPD (*United Democratic Party*), la dua plej granda partio de la lando, opiniis, ke ĉi tiu flago ne reprezentis la unuecon de la lando, ĉar ĝi estis tre simila al tiu de la PUP.

Tial, oni anoncis konkurson organizitan de "*National Symbols Commitee*". Post la konkurso oni elektis projekton prezentintan de du publikaj oficistoj: Everal Waight, permanenta sekretario, kaj Inéz Sánchez, edukacia ĉefoficisto. Ili bazis sian desegnon sur la flago proponita de PUP, tamen ili aldonis du ruĝajn bendojn, reprezentantaj la partion UDP, kiu uzis blankan kaj ruĝan flagon, jen simbolo de la unueco de la nacio, tiel ke ĉiuj civitanoj povus agnoski sin en la flago, sendepende de ties politika kredo.

La ŝtata blazono igas la flagon de Belizo speciala, ĉar oni povas vidi tie du kompletajn homajn estaĵojn. Vere, ekzistas pliaj du ŝtatoj kiuj havas flagojn kun similaj desegnoj, ambaŭ estas eksaj britaj kolonioj, Moncerato kaj Britaj Virgulininsuloj.



Flago de Brita Honduraso (1919-1981) sur kiu estas videbla la ŝildo de la malnova Ŝtata Blazono.

Por la ŝtata blazono la desegnistoj uzis tiun de la antikva kolonio, nur kun kelkaj detalaj ŝanĝoj. Ekzemple, la brita flago (*Union Jack*) estis forigita de la supra kantono sur la ŝildo. Same, oni ŝanĝis la haŭt-kolorojn de la figuroj, origine ambaŭ estis nigr-haŭtuloj.




La nova ŝtata blazono estas tripartia ŝildo ("forktranĉo konvertita" - dividita en tri sekcioj per vertikala linio kaj inversa V).

En la suba fako, ŝipo navigas kun ventoplena velaro sur maraj ondoj. En la duaj supraj fakoj oni povas vidi la ilojn uzatajn por prilaborado de ligno, dekstre pagajo kun ortangula adzo, maldekstren segilo kaj klava adzo.

La ŝild-tenantoj estas du arbo-hakistoj: tiu dekstren, brun-haŭta, simbolas la mestizojn de la insulo, li tenas adzon. Tiu maldekstren, nigr-

haŭta, simbolas la loĝantaron kun afrikaj originoj, li tenas pagajon. Super la ŝildo oni povas vidi mahagonan arbon, kiu rilatas al la historio de Belizo, ĉar prilaborado de la ligno estis la ĉefa resurso de la ekonomio de la lando dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj.

Sube, ene de kartuŝo, aperas la ŝtata devizo en la latina lingvo "*Sub Umbra Floreo*", kun la signifo "mi floras sub l'ombro". Rondo de 50 verdaj folioj (25 "propraj folioj") ĉirkaŭas la tutan blazonon. Verŝajne ĝi simbolas la jaron 1950, kiam fondiĝis la Kontraŭ-Kolonia Popola Komitato, antaŭulo de PUP.

**Oficiala priskribo de la blazono.**

El "Royal College of Heraldy" en Britio, eldonita fare de Elizabeta la 2-a, Reĝino de Belizo, ĝis la sendependenco en la jaro 1981.

- Kresto: natura mahagona arbo.
- Subaĵo: natura herbejo.
- Ŝildo: konvertita forktranĉo. Ene de la unua kantono, arĝenta pagajo kaj ortangula adzo kruciĝitaj. En la dua, ora segilo kaj aŭtentika klava adzo kruciĝitaj. En la tria, trabe lazura kaj maro nigre onda sur la lasta velŝipo aŭtentika.
- Ŝild-tenantoj: dekstren, mestiza arbo-hakisto propre vestita per arĝenta pantalono, tenanta batan kakilon en sia dekstra mano. Maldekstren, afrika arbo-hakisto, propre vestita per arĝenta pantalono, portanta aŭtentikan pagajon en sia maldekstra mano.
- Devizo: *Sub Umbra Floreo*.
- Aliaj elementoj: ĉio ĉirkaŭigita de 25 propraj folioj.

Informo de la redakcio de la revuo.
Sur kelkaj artikoloj, la flagoj reprezentataj aperas kun griza aŭ nigra kontur-linio



Ĉi tiun grafikan rimedon ni uzas NUR kiam la flago aŭ parto de la flago reprezentanta estas blank-kolora. Ni tiel celas videbligi kiel eble plej bone la flagon reprezentatan. Kompreneble tiuj nigraj aŭ grizaj linioj reale ne aperas reale sur la flago.

# Lastaj Informoj pri Flagoj



## Nova flago en Afganio

Antaŭ unu jaro, en majo 2021, la okcidentaj soldatoj, ĉefe usonaj, kiuj kunlaboris kun la registaro de la tiea prezidento retiriĝis de Afganio. La 15-an de aŭgusto la prezidento Ashraf Ghani kaj la membroj de la afgana registaro forfuĝis, la talibanoj tiam eniris en Kabulon, la afgana ĉefurbo. Ili depost tiam estas la novaj regantoj de ĉi tiu azia ŝtato. La novaj aŭtoritatuloj tuj decidis ŝanĝi la afganan flagon. Malaperis tiam la tradicia trikolora standardo kaj oficialiĝis la blanka flago tradicie uzitaj de la talibanoj.

La nova flago estas blanka, sur ĝi aperas, en nigraj literoj, la ŝahado. Temas pri konfeso de islama kredo aŭ deklaro de fido en ununura dio (Allah, en la araba lingvo), kongrue kun la islama kredo kaj la instruado de Mahomedo. Ties deklamado estas konsiderata unu de la kvin pilieroj de Islamo.

Oni povas traduki kiel: *Ne estas plia dio ol Dio, Mahomedo estas la mesaĝisto de la Dio.*




Nova afgana flago post aŭgusto 2021

Flago tute blanka jam estis uzita de la muĝahidoj, kies membroj luktis kontraŭ la soveta armeo okupanta Afganion fine de la 7-a jardeko kaj komence de la 8-a de la pasinta jarcento. Talibanoj eniris en Kabulon en la jaro 1996 flirtigante blankan flagon, kiu fariĝis la oficiala simbolo de la islama emirejo de Afganio. En la jaro 1997 oni aldonis la ŝahadon al la flago.

## Kontraŭ-milita flago en Rusio

Kvankam tute malpermesitaj en Rusio, okazis en Moskvo kaj en aliaj urboj protestoj kontraŭ la milita agreso plenumita de Rusio kontraŭ Ukrainio. La manifestaciantoj, okaze de la publikaj protestoj, portis rusan flagon, al kiu oni demetis la suban ruĝan strion. Por ili la ruĝa koloro estas la simbolo de la perforto kaj de la krŭelaj agadoj okazantaj dum la milito. La flago ankaŭ inspiriĝas de la belrusa flago flirtigita okaze de popolaj protestoj inter la jaroj 1991 kaj 1995, kvankam la centra strio de tiu belrusa flago estis ruĝa, anstataŭ la blua rusa standardo.




La publika portado de ĉi tiu flago en Rusio estas konsiderata kiel delikto. Tiel, la pasintan 6-an de marto 2022, S-ino Anna Dubkova estis arestita de policisto en Moskvo, ĉar ŝi metis blank-blu-blankan flagon sur ŝia aŭtomobilo. Tribunalo kondamnis ŝin al malliberigo dum 15 tagoj.

# Ne plu, novaj emoĝioj pri flagoj

La *Unicode Consortium* (Unikoda Konsorcio),internacia organizaĵo kiu mastrumas normon de la komputila industrio por la konsekvenca enkodigo de signoj, alfabetoj, nombroj kaj emoĝioj en skribojn, decidis ne krei novajn emoĝiojn pri flagoj. La ĉefa kialo estas, ke ili ne estas ade utiligitaj okaze de konversacioj. Tiel, el la 3600 nuntempe ekzistantaj emoĝioj, nur 200 estas flagoj, sed neniu el tiu flagoj aperas inter la emoĝioj plej uzataj depost la jaro 2021, kaj eĉ ne antaŭe. Nuntempe emoĝioj pri flagoj estas nur uzataj por diskonigi la civitanecon de la uzantoj de la sociaj retejoj.

Tamen, alia ebla kaŭzo ekzistas, laŭdire oni troigis la petojn por krei emoĝiojn de novaj flagoj ne nur de ŝtatoj internacie agnoskitaj, sed ankaŭ de regionoj, komunumoj, urboj, movadoj, ktp. Fakuloj asertas, ke se oni kreas emoĝiojn de konkreta regiono, tio povus esti manko de konsidero rilate aliajn, kiuj ne disponas pri tiu simbolo en la sociaj retejoj. Do, oni proponis salomonan decidon, ekde nun oni kreos flag-emoĝiojn nur de ŝtatoj membroj aŭ agnoskitaj de Unuiĝintaj Nacioj. Kompreneble, tiuj jam ekzistantaj, eĉ se ne rilatas al tiaj ŝtatoj, daŭre estos uzataj.



Flagaj emoĝioj, inter ili kelkaj de ne-sendependaj insuloj aŭ teritorioj

# La fotografaĵo de niaj legantoj




Apud la hispana kaj la andaluzia flagoj flirtas la standardo de la Ruĝa Kruco, en ties hospitalo en la urbo Kordovo (Hispanio). Julio 2022.

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# La flagoj de la Papa Ŝtato

Kvankam oficiale fondita en la jaro 1929, dank'al la Lateranaj Paktoj subskribitaj inter la Papo kaj Italio, certe la Papa Ŝtato enradikiĝas profunde en la Historio. La papoj, estroj de la katolika eklezio kun sidejo en Romo, jam dum la 4-a jarcento havis vastajn bienojn en kaj proksime al la eterna urbo. Lia potenco fortiĝis, kiam li protektis Romon kontraŭ la barbaroj, post la disfalo de la Okcidenta Romia Imperio.



Flago de Vatikanurbo

Post kelkaj akordoj kun najbaraj reĝoj inter la 8-a kaj la 11-a jarcentoj, la romia ĉefpontifiko akiris sufiĉe grandajn teritoriojn tra la itala duoninsulo, kaj eĉ fore de ĝi, ekzemple, la urbo Avinjono, kiu troviĝas en la sud-orienta parto de Francio, ankaŭ estis posedaĵo de la Papo. Tiel, mez-epoke, la romia Papo, krom religia estro, ankaŭ estis feŭda senjoro en multaj teritorioj, temis pri la tiel nomata: Papa Ŝtato. Kompreneble, la ĉefurbo de tiuj teritorioj estis la urbo Romo, kie tradicie sidejis la estro de la katolika eklezio. Pro tio, kaj ankaŭ pro la konstanta uzo de la latina lingvo, ĉi tiuj regionoj sentis sin iamaniere kiel posteulojn de la Romia Imperio. Eble pro tio, la unua flago de tiu teritorio montris la tradiciajn kolorojn de tiu imperio, tio estas: ruĝa kaj flava, kiuj jam aperis sur la tradiciaj simboloj de la romiaj legioj.




Standardo de romia legio



Flago de la Papa Ŝtato

En la jaro 1797 la Napoleona franca armeo invadis la nordajn regionojn de la itala duoninsulo, kiu tiutempe ankoraŭ dispeciĝis en kelkaj regnolandoj kaj princolandoj, inter ili la Papa Ŝtato. La Papo tiam perdis kelkajn teritoriojn en la nordo, poste la francaj trupoj eĉ eniris en Romon, tiam Napoleono kaj la italaj revoluciuloj postulis al la ĉefpontifiko rezigni sian teritorian suverenecon. En la jaro 1798 Francio malliberigis la Papon, kiu devige marŝis en Francion, tiel li forpasis. Dume, oni proklamis tiam la Romian Respublikon. La flago de tiu nova ŝtato estis ege simila al tiu de Francio, al kiu ĝi vere apartenis kiel iaspeca protektorato.



Flago de la tiel nomata: *Unua Romia Respubliko*

En la jaro 1801, Napoleono permesis al la nova Papo, Pio la 7-a, reveni en Romon, tie la francaj trupoj daŭre okupis la urbon. La ĉefpontifiko devige akceptis tiun situacion. En la jaro 1808 la Papo protestis energie kontraŭ la franca okupacio de la urbo kaj, inter alie, li ordonis al siaj fideluloj uzi novan simbolon, ĉi-foje flava kaj blanka, por diferencigi ilin disde la francaj trupoj. En tiutempa ĵurnalo la abato Luca Antonio Benedettalla skribis:


*"La Papo, por diferencigi la romiajn soldatojn kiuj troviĝas sub la ordonoj de la franca komandanto disde tiuj malmultaj kiuj restas je Lia servo,ĵus ordonis porti novan insignon flavan kaj blankan. Ĝi jam estas ekzuzita de la nobelaj kaj svisaj gvardioj."*

Samtempe, la Papo komunikis tiun ŝanĝon en la simboloj de la ŝtato al la eksterlandaj diplomatistoj kiuj sidejis en Romo. La insigno fariĝis flago, unuamomente la linio dividanta ambaŭ kolorojn estis diagonala, vertikala se temis pri la flago de la komerca ŝiparo de la Papo. En la jaro 1825 definitive la flago estis tiu kun vertikala divido.


Kial oni elektis la kolorojn flavan kaj blankan? Nu, temas pri la tradiciaj koloroj de la du ŝlosiloj kiuj tradicie aperis en la sigelo de la Papa Ŝtato.



Tradicia sigelo de la Papoj



Flago de la Papa Ŝtato inter la jaroj 1808 kaj 1825



Flago de la Papŝtata ŝiparo depost 1808 kaj de la ŝtato mem post 1825

La napoleonaj trupoj arestis la Papon, kiu restis enkarcerigita en Francio. Post la malvenko de Napoleono kaj okaze de la Viena Kongreso en la jaro 1815, la eŭropaj potencoj akceptis la ekziston de teritorio kies suvereno estas la Papo, kvankam la teritorio vere malpliiĝis kun transdonoj al Francio kaj al Aŭstrio.

La franca revolucia spirito kaj la deziroj ekzistantaj tra la itala duoninsulo por unuigi la tutan landon ankaŭ aperis ĉe la Papa Ŝtato. Tiel, en la jaro 1831 okazis popola ribelo en la urbo Modeno, tie oni malhisis la papan flagon kaj la ribelantoj flirtigis la novan italan trikoloran flagon. Post kelkaj semajnoj la ribelado trakuris la tutan Papan Ŝtaton. Ne estis eble sufoki la revolucion, pro tio la Papo petis la helpon de la aŭstria imperiestro, kies trupoj metis finon al la ribeladon. Tiu revolucio finiĝis, tiam reprezentantoj de la plej gravaj eŭropaj potencoj kiel Aŭstrio, Rusio, Britio, Francio kaj Prusio renkontiĝis en Romo por debati pri la estonteco de la teritorio. La eksterlandaj diplomatoj petis al la


Papo enirigi ŝanĝojn en la administradon de la teritorioj. Tamen, la revolucio, kvankam sufokita, ĝi tute ne malaperis.

En la jaro 1848 la sarda reĝo Karlo Alberto ekigis lukton kontraŭ Aŭstrio cele la kompletan unuigon de la itala duoninsulo. La Papo ne aliĝis al tiu celo, tiam la romia popolo ribeliĝis kaj oni proklamis la duan romian respublikon. La Papo devis ekziliiĝi.




Flago de la tiel nomata: *Dua Romia Respubliko*

Kelkaj katolikaj eŭropaj ŝtatoj kunlaboris kun la Papo sendante soldatojn por lukti kontraŭ la ribelantoj, tiel la ĉefpontifiko denove eniris en la enternan urbon en la jaro 1850. Tamen, preskaŭ la tutaj teritorioj de la Papa Ŝtato decidis aliĝi al la nova unuigita itala regnolando, pro tio la Papo nur daŭris kiel suvereno de la urbo Romo, tie li restis dank'al la helpo de la francaj trupoj. Kiam la Papo Pio la 9-a revenis en Romon el la ekzilejo, li aldonis al la blanka flanko de la flago la tradician blazonon kun du ŝlosiloj kaj tri kronoj de la papoj.



Flago de la Papa Ŝtato depost 1850. Tradicie la flago uzas la proporcion 1:1 (kvadrata flago), simila al la svisa flago, pro la fakto, ke la armeo de la Papa Ŝtato estis svis-devena.

En la jaro 1870 ekigis milito inter Francio kaj Prusio. La franca imperiestro, Napoleon la 3-a, ordonis revenigi la francajn trupojn kiuj restis en Romo, ĉar li bezonis ĉiujn trupojn en sia lukto kontraŭ Prusio. Tiam, la italaj soldatoj marŝis en Romon, ok mil soldatoj de la Papo ne sukcesis halti la italan armeon. Do, Romo estis okupata de la trupoj de la unuigita regno-lando, kiu estis proklamata kiel ĉefurbo de la unuigita Itala Regnolando. La Papo deklaris sin men kiel prizonulon de Italio.

En la jaro 1900 oni festis la 30-an datrevenon de la okupo de la urbo, ĝuste tiam oni decidis la juran nuligon de la tiama Papa Ŝtato, kvankam en la praktiko ĝi ne ekzistis de antaŭ multe da tempo. Italio decidis trovi taŭgan solvon al la tiel nomita "Roma afero", tiel, malgraŭ la ne-ekzisto de teritoria suvereneco fare de la Papo, la itala registaro permesis la ekziston de ambasadejoj en Romo antaŭ la ĉefpontifiko, kaj la nomumon de diplomataj reprezentantoj en aliaj landoj fare de la Papo.

En la jaro 1929 la Papo Pio la 11-a kaj la ĉefministro Benito Mussolini, nome de la itala reĝo, subskribis la "Lateranajn Traktatojn", laŭ kiu Italio agnoskis la ekziston de malgranda ŝtato, fakte la plej malgranda en la mondo kun nur 44 hektaroj, meze de la urbo, sub la jurisdikcio kaj suvereneco de la Papo, kun la nomo Vatikanurbo. La flago adoptita estis tiu flava kaj blanka de la Papa Ŝtato, kiu denove flirtis meze de Romo la 7-an de junio 1929. La flago estas videbla tutmonde, ne nur en la vatikanaj ambasadejoj, sed ankaŭ en preĝejoj kaj institucioj de la katolika eklezio.






Ĝis la jaro 1870 la Papa Ŝtato ankaŭ disponis pri propra ŝiparo. Maldekstre la batal-standardo, dekstre la flago uzita de la komerca ŝiparo de tiu ŝtato.

# Veksilologia kuriozaĵo

## *La flago kiu ne kongruas kun la nomo de la lando*

Tuvalo estas sendependa ŝtato, kiu situas inter Aŭstralio kaj la Havaja insularo, meze de la Pacifika oceano. La teritorio sendependiĝis en la jaro 1978, antaŭe ĝi estis konata kiel "Insularo Ellice". La insularoj Ellice kaj Gilbert estis britaj protektoratoj depost 1896 kaj kolonioj en 1916. En la jaro 1976 la koloniaj aŭtoritatuloj organizis referendumon, kies rezulto estis dividi la koloniojn en du teritorioj kiuj estus sendependaj en la jaro 1978. La insularo Gilbert fariĝis Kiribato kaj la insuloj Ellice Tuvalo.




Kolonia flago de la insularo Ellice kaj Gilbert ĝis la jaro 1976




Flago de la sendependa Kiribatio (eksa Insularo Gilbert)

La kolonia flago de ambaŭ teritorioj estis poste la bazo de la nova kiribata respubliko, pro tio tuvalanoj devis adopti propran simbolon ĝuste antaŭ la sendependiĝo. La flago elektita estis simila al mapo, aperis sur ĝi la ĉiama kolonia brita flago, kun blua fono -kvankam ĉikaze temis pri hela bluo- kaj stelaro reprezentanta mapon de la insularo. La steloj aperas sur la flago ne laŭ geometria figuro, sed en la dispono kie ili troviĝas sur la maro.




Do, por reprezenti la landon sur la flago, oni decidis aperigi naŭ stelojn, kiuj reprezentas tiujn naŭ insulojn kaj atolojn de la lando.



La ne-kongrueco inter la flago de Tuvalo kaj la lando mem ŝuldiĝas al la fakto, ke la nomo de la lando *Tuvalu* signifas en la tuvala lingvo "Kunaj Ok". La nomo memorigas la nombron de insuloj kies enloĝantaro sopiris al la fondiĝo de nova ŝtato. Tamen, la insularo havas naŭ insulojn, kio okazis al la cetera insulo? Ĉu ties enloĝantoj rifuzis la ideon pri sendependeco? Tute ne, la afero estas, ke tiu naŭa insulo estis sen-homa en la momento de la sendependiĝo.

Por iamaniere "solvi" ĉi tiun aferon la registaro proponis novan flagon en la jaro 1995. Tamen la uzo de ĉi tiu simbolo nur daŭris du jarojn, ĉar aperis kontraŭaj opinioj rilate ĉi tiun simbolon. Ene de ĝi efektive aperis nur ok steloj.

Flago de Tuvalo, kun nur 8 steloj. Oficiala de la jaro 1995 ĝis 1997




En la jaro 1997 la standardo denove ŝanĝiĝis. Nun la tuvala flago daŭre estas tiu hel-blua kun naŭ flavaj steloj. La aŭtoritatuloj trovis alian solvon por la problemo de la steloj sur la flago, ili favorigis la repopoladon de tiu senhoma insulo. Tiel, de antaŭ kelkaj jaroj 35 homoj jam loĝas en la malgranda insuleto Nialukito, la plej suda insulo en Tuvalo.

# La angulo de la blazonoj

## *San-Marino*

San-Marino estas unu el la plej manovaj ekzistantaj respublikoj en la mondo -laŭdire la plej antikva-. Ĝi troviĝas meze de la itala duoninsulo, tute ĉirkaŭigita de itala teritorio. Ĝia historia origino situas antaŭ la mezepoko, ĝi estis fondita en la jaro 301 de Sankta Marino, pro tio la nomo. Pro ĝia malgrandeco, nur 61 kvadrataj kilometroj kaj proksimume 33.500 enloĝantoj, San-Marino vere estas mikroŝtato, la kvina plej malgranda en la mondo. En la jaro 1992 la lando aniĝis en Unuiĝintaj Nacioj, sed ĝi ne estas membro de Eŭropa Unio.

La ŝtata flago de San-Marino estas formata de du egalaj horizontalaj strioj, blanka en la supra parto kaj helblua en la suba. Meze de la flago aperas la blazono de San-Marino.







Flago kaj blazono de San-Marino

La originoj de la sanmarina blazono troviĝas en la 14-a jarcento. Ene de ĝi aperas la tri rokegoj (*Cesta, Guaita* kaj *Montale*) de la impona monto Titano, sub kiu kuŝas la urbo. Sur ĉiu rokego stariĝas turo. La blazono havas kor-formon kaj ĝi estas ĉirkaŭigita de laŭro-branĉo. Sur la ŝildo aperas reĝa krono. Verdire San-Marino neniam estis regnolando, ĝi eĉ estas konsiderata kiel la plej antikva respubliko en la mondo, ĉi-kaze la krono reprezentas la suverenecon de la respubliko. Sube aperas devizo kun ununura vorto en la latina lingvo: “LIBERTAS” (Libereco). Ĝui sian sendependecon kaj liberecon estis la plej grava deziro de la malgranda respubliko tra multaj jarcentoj.

# Flagoj kaj poŝtmarkoj:

# *Hispanaj Aŭtonomaj Komunumoj*





La politika debato en Hispanio pri teritoria unueco aŭ federalismo estas konstanta tra la historio de ĉi tiu sud-eŭropa lando, kaj ĝi ŝajnas ankoraŭ ne definitive solvita. En la jaro 1978, post la morto de la diktadoro Franko, Hispanio aprobis demokratian konstitucion, kiu havigis memstarajn fakojn al regionoj, tamen sur la leĝa teksto nenie aperas la vortoj “federala” aŭ “federalismo”, sed “aŭtonomaj komunumoj”. Verdire, kelkaj el tiuj komunumoj estas certe federalaj regionoj, kiel la usonaj ŝtatoj aŭ la germanaj landoj.

Tiuj aŭtonomaj komunumoj, pli malpli, korespondas kun la historiaj landoj kiuj formis Hispanion dum multaj jarcentoj, tamen kelkaj el ili ankaŭ estis nove kreitaj. Entute, Hispanio estas formata de 17 aŭtonomaj komunumoj plus 2 aŭtonomaj urboj (Ceŭto kaj Melilo) en la nordo de Afriko. Kompreneble, ĉiu komunumo havas sian propran flagon kaj blazonon.

En la jaro 2009 la hispana poŝta servo komencis eldoni poŝtmarkojn kie aperas la konturo de la aŭtonoma komunumo kune kun ties flago. La serio daŭriĝis ĝis la jaro 2011, aperis dum tiuj jaroj poŝtmarko de ĉiu aŭtonoma komunumo kaj urbo kie videblis elstare ties flagojn. Oni eldonis samtempe al tiuj poŝtmarkoj dediĉitaj al la komunumoj, aliaj kie aperis la hispana flago kaj blazonon, kaj la sidejoj de la pintaj politikaj institucioj de la ŝtato (Parlamento, Senato kaj Konstitucia Kortumo).




Poŝtmarkoj eldonitaj en la jaro 2009




Poŝtmarkoj eldonitaj en la jaro 2010




Poŝtmarkoj eldonitaj en la jaro 2011

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

**Sciu, ke...**

estas eble legi pasintajn numerojn de nia revuo. Vi nur devas viziti jenan TTT- paĝon:

www.esperanto.ac/vento

Aliro kaj legado de revuoj estas tute senpaga.



# *Trovu la eraron !*






***Dank-esprimo al Aŭstrio pere de aŭstralia flago !!!***

La pasintan 26-an de junio la usona kvaropo "*Kiss*" prezentis en Vieno (Aŭstrio) sian muzikan spektaklon "*End of the Road Tour*". Kiel kutime okazas en la prezentaĵoj de ĉi tiu metalroko muzikbando, grandega lum-reklamo aperis fone de la scenejo. Pere de ĝi la bando dankas la ĉeeston al la publiko.

Tiunokte la grupo *KISS* aperigis jenan grandan luman afiŝon *"Kiss loves you Vienna"* (Kiss amas vin Vieno). La grandaj literoj de la vorto *KISS* aperis formita de la "aŭstralia" flago.

Sendube la organizantoj konfuzis Aŭstrion kun Aŭstralio, ĉar la koncerto okazis en Vieno, ne en Oceanio !

## Kiel kunlabori kun *VENTO*

• Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

• Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

• Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

• La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

• Memoru, ke nia ret-adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac



## Demarŝoj por la fondiĝo de Veksilologia Faka Asocio en Esperantio.

Ni jam informis sur la pasinta numero, ke ni deziras organizi retan kunvenon pere de la sistemo Google Meet, kun la celo fondi oficiale fakan asocion por flag-amantoj scipovantaj aŭ simpatiantaj al internacia lingvo.

Kun tiu celo ni redaktis proponon por statuto, kiun vi povos legi ĉe
http://esperanto.ac/statuto-de-vento/

Kompreneble temas nur pri propono. La statuto estas redaktita konforme al hispana leĝaro, pro la fakto, ke plimulto el la iniciatoroj de la ideo leĝigi veksilologian asocion estas hispanoj, sed kompreneble, temas pri internacia organizo en kiu ĉiuj rajtas partopreni, kiel membroj aŭ estraranoj.

Plejeble la reta kunveno okazos en la komenco de la monato oktobro, se vi deziras ĉeesti bv. kontakti kun cordoba@esperanto.ac

## Veksilologia Humuro



*Jen la flago de la Hommeranismo !*



XIIa
KONGRESO
DE K.E.F.
PALMA DE MALLORCA
21-24 MAJO 1925
FLORAJ LUDOJ,
EKSKURSOJ, FESTENO, k.t.p.